

# Espero Katolika



**Du elstaraj  
esperantistaj pastroj  
iris al la Domo de la Patro**

**Numero 4-6/2010**

**Aprilo-Junio 2010**



**Sur la kovrilo:** Ĉi tiu numero estas tute dediĉita al Pastroj Duilio Magnani kaj Manuel Casanoves, kiuj forpasis ambaŭ en aprilo ĉi-jare, en la spaco de 5 tagoj.

## ENHAVO

### PASTRO DUILIO MAGNANI (11.06.1928 - 20.04.2010)

Biografio	23
Kroniko de la funebra rito	24
Lia spirita testamento	25
Mesaĝo de la prezidanto de IKUE	26
Mesaĝo de la ĝenerala sekretario de IKUE	27
Rememoroj de la IKUE-prezidanto pri li	29

### PASTRO MANUEL CASANOVES (31.08.1927 - 15.04.2010)

Lia vivo kaj agado en la vortoj de lia superulo	35
---	----

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>  
TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> \* Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>  
UEA-konto "ikue-v" \* Banko: "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio  
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

**Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma**  
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

**Presejo - Tipografia**

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

**Respondeca Direktoro - Direttore responsabile**

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio  
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.  
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj  
fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de  
la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Prezidanto:** Miloslav Švábek - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila  
Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto,**  
**direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor,  
Bruno Masala, Stanisław Śmigielski - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrik.

## PASTRO DUILIO MAGNANI FORLISIS NIN

La 20-an de Aprilo 2010, en Rimini, jaraĝa pastro Duilio Magnani. Li naskiĝis la 11-an de Junio 1928 en Misano Adriatico en malriĉa familio de kamparanoj. Dum la milito li vizitis la mezgradan lernejon en Trento kaj poste gimnazion en Rimini. Li studis teologion ĉe la papa Seminario de Bolonjo kaj pastrigis la 28-an de Junio 1953. En 1964 li fariĝis paroĥestro de la paroĥo de San Giuliano a Mare (Rimini) kaj tie paroĥestris ĝis 2003, kiam li devis prezenti sian demision atinginte la 75-an jaraĝon.

En Rimini li renkontiĝis kun pastro Albino Ciccanti, iama prezidanto de UECI, kiu enkondukis lin al Esperanto. Li esperantiĝis en 1969 trapasante la unuagradan ekzamenon. Sed tio, kio lin plej konvinkis en lia pasio por Esperanto estis okazintaĵo de 1973, kiam li renkontis hazarde en Pollando kardinalon Stefanon Wyszyński, kiu diris al li: “En la unua vatikana Koncilio, oni parolis nur en la latina, en la dua oni parolis en ĉiuj lingvoj. En la tria, se ĝi okazos, oni parolos en Esperanto”. De tiam li iĝis agema esperantisto: en 1976 li iĝis ĝenerala sek-



retario de UECI kaj en 1979 prezidanto de IKUE, ofico kiun li tenis ĝis 1995, kiam li estis devigita demisii. La jaroj de lia prezidanteco estis la “oraj jaroj” de IKUE: li sukcesis unue en la verkado de la roma Meslibro en Esperanto kaj en ties aprobo fare de la Sankta Seĝo (1990 – sen liaj senlacaj zorgoj ni hodiaŭ ne havus Meslibron), due en la oficiala agnosko de IKUE kiel privata internacia asocio de fideluloj fare de la “Papa Konsilio por la Laikoj” (1992), trie en la bondeziroj en E-o fare de la Papo antaŭ la paskaj kaj kristnaskaj benoj “Urbi et Orbi” (1994) kaj en la sama jaro li lanĉis la kampanojn por doni stabilan sidejon al IKUE en Romo.

Dum lia prezidanteco pligrandiĝis la bonfara agado pere de E-o precipe dum la pola krizo de la jaroj 1982-84 per la alsendo de nutrovaroj kaj vestaĵoj al polaj esperantistoj. Tiun agadon li daŭrigis ankaŭ post sia prezidanteco favore de la malriĉaj landoj, precipe en Afriko. Pro tio en 2004 li fondis en Rimini CER-ES (Centro Esperantista Rimina – Ekumena kaj Solidara).

Malgraŭ la kancero, malkovrita

### LA KOVRILA FOTO DE PASTRO DUILIO

*Dum unu el siaj bonfaraj vojaĝoj al Afriko Pastro Duilio vizitis la 27an de junio 2004 en Ouidah (Benino) la lokan Templon de la Pitonoj: tie la animistoj petas respekton por sia sanktejo kaj sekve invitas surmeti pitonon ĉirkaŭ la kolon, kvazaŭ “sanktan” kolringon.*

antaŭ du jaroj, kiu trafis lian stomakon kaj hepaton, li daŭrigis sindonemegan agadon; li vizitis Kongolandon la lastan fojon la pasintan jaron. En la lastaj semajnoj la disvastiĝo de la malsano ankaŭ al ezofago ne plu ebligis al li akcepti la nutraron, pro tio li estis enhospitaligita en malsanulejo de Rimini, kie li mortis post longa agonio, dum kiu li estis klarmensa ĝisfine. Liaj lastaj vortoj estis: “Sinjoro, venu alpreni min, ĉar mi ne plu eltenas”.

Kelkajn monatojn antaŭ sia forpaso li starigis fondaĵon, kiu daŭrigos kaj subtenos la solidarecajn intervenojn de CER-ES.

En Rimini li lasis ankaŭ videblan ateston de sia emo al Esperanto: temas pri la tiel nomata “Katedralo de la Esperantistoj” t.e. la preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo, kies vandoj estas kovritaj de mozaikoj kun skribaĵoj en la itala lingvo kaj en Esperanto. Kelkaj monatoj antaŭ sia forpaso li sukcesis aldoni, ĉe la elirejo flanke de la ĉefpordo, du kromajn mozaikojn kun la teksto de Patro Nia en Esperanto kaj en la rimina dialekto por rimarkigi, ke Esperanto ne intencas forigi la lokajn lingvojn. Sed plej grave por li estis la “Bonfara Katedralo”, ĉar, kiel skribis sankta Johano Krizostomo: “Ornamu la templon, sed ne forgesu la povrulojn”.

Kiel en ĉies vivo, ankaŭ en lia vivo

estis tagoj ĝojaj kaj malĝojaj. Pri iuj, ni eble neniam scios, sed kelkaj liaj intimaj suferoj, kiuj kondiĉigis la lastajn jarojn de lia vivo, estas bone konataj de ĉiuj, kiuj lin konis. La unua ekestis, kiam li estis devigata rezigni je la prezidanteco de IKUE laŭ la volo de la episkopo de Rimini; la dua, kiu multe tristigis lin, estis la forlaso de la estrado de sia paroĥo pro atingitaj aĝo-limoj, kaj vidi ĝin aneksita al la apuda paroĥo (en privata interparolo li diris al mi: “Por mi la paroĥo estas kiel edzino: oni forlasas ŝin nur en la morto”), kaj laste, lia seniluziĝo pro tio, ke li ne sukcesis post multaj streĉoj disvastigi la uzadon de Esperanto inter siaj proksimuloj, eĉ ne ĉe la anoj de CER-ES mem.

Malgranda konsolo finfine alvenis al li antaŭ unu jaro, kiam la nova episkopo nomumis lin dumviva rektoro de lia “Katedralo de la Esperantistoj”.

Ankoraŭ multon oni povas diri pri lia vivo agema kaj malkvieta; ĉirilate ekaperas en la menso la vortoj de Apokalipso (3, 15-16): “Vi estas nek malvarma, nek varmega; mi volus, ke vi estu aŭ malvarma aŭ varmega. Tial, ĉar vi estas varmeta, kaj nek malvarma nek varmega, mi elsputos vin el mia buŝo.”

Nu, pastro Duilio estis varmega (eĉ tro), tial tute certe la Sinjoro varmege enprenis lin inter siajn sanktulojn.

*Giovanni Daminelli*

## **Kroniko de la funebra rito**

La 22-an de aprilo 2010 posttagmeze en Rimini ĉe la preĝejo de sanktaj Johano kaj Paŭlo okazis la funebra rito por pastro Magnani. La funebrano celebris la episkopode Rimini, monsinjoro Francesco Lambiasi kun kvardeko da pastroj, kun la ĉeesto de multenombraj paroĥanoj kaj de grupo da esperantistoj, inter ili la

prezidanto de UECI, Giovanni Daminelli kaj la eksprezidanto D-ro Serio Boschin. La preĝejo estis tiel plena, ke multaj ne povis eniri. Dum sia homilio la episkopo rememoris sian lastan renkontiĝon kun li en la hospitalo, kiam ili kune preĝis Patro Nia’n, kaj li dufoje ripetis “fariĝu via volo” montrante sian repaciĝon. Li

mortis kun Kristo, daŭrigis la episkopo, ĉar en la momento de nia morto Kristo estas apud ni kaj partoprenigas nin en sia morto kaj en sia resurekto; nun certe pastro Duilio preĝas, por ke ankaŭ ni povu morti kun Kristo kaj resurekti kun Li. Je la fino de sia homilio la episkopo legis la spiritan testamenton de pastro Duilio, kiu, tradukita, estas legebla sube.

Dum la Universala Preĝo la prezidanto de la UECI-Sekcio de Rimini Andrea

Belletti legis preĝon en Esperanto kaj en la itala, kaj antaŭ la komunio paroĥanino kortuŝita sendis la lastan saluton al pastro Duilio nome de la paroĥanoj. Tuj poste la prezidanto de UECI legis mesaĝon senditan de la prezidanto de IKUE Miloslav Šváček (legebla pli sube).

Fine de la Meso, la episkopo benis la ĉerkon kaj restis iomete kun la parencoj. Poste oni forveturigis la mortinton al tombejo de Riccione.



*Funebra rito: komunio de la fideluloj (foto de Giuliano Rocchi)*

## Lia spirita testamenton

Konfesante ĉiujn verojn de la Kredo de la Katolika Eklezio, apostola kaj roma, mi deziras vivi ĉi tiujn lastajn tagojn en la Dia Volo kaj morti ripetante kun Kristo: “En viajn manojn, ho Patro, mi remetas mian spiriton.”

Mi intencas aliĝi en la ofero al Patro

de miaj celebrantaj Kunfratoj: “Per Kristo, kun Kristo kaj en Kristo, al Vi, Dio Patro Ĉiopova, en unueco kun la Sankta Spirito, estu ĉiu honoro kaj gloro”, por kompensi tiun honoron kaj gloron, kiujn en mia vivo mi forŝtelis de la Sanktega Triunuo.

Mi konscias, ke mi estis senutila servisto kaj ilo mizera en la manoj de Dio. Lia mizerikordo brilegos supermezure super mia mizero. Mi petas pardonon kaj mizerikordon al ĉiuj kaj precipe al la fratoj, kiujn la Eklezio al mi konfidis, kiujn mi ĉiam amis kaj neniam forgesis: la komunumojn de Sankta Savino, de Sankta Ermeto, de la Santaj Johano kaj Paŭlo, la Dioceza virina Katolika Agmovado, la Apostola Movado de Blinduloj, la Surdmutuloj, la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Se oni permesas al mi lasi al ĉiu kaj al ĉiuj memoraĵon, mi volus indiki la Rozarion kaj la Sanktan Meson. Ili estas necesaj iloj kaj absoluta garantiaĵo de la komuneco kun Dio kaj inter vi, vivantoj kaj mortintoj.

Dankema al ĉiuj kaj min konfidante al la preĝoj de ĉiuj, sur ĉiujn mi alvokas nun kaj ĉiam la Dian Benon kaj la protektadon de la Virgulino Maria, de Sankta Jozefo kaj de Sankta Patro Pio.

*Rimini, 19.03.2004  
Solenio de Sankta Jozefo*

## Mesaĝo de la prezidanto de IKUE

Tre estimataj, kun profunda malĝojo en la koro mi ricevis la sciigon, ke la Sinjoro, Reganto super la vivo kaj la morto, forvokis sian fidelan serviston, pastron Duilion Magnani, el la surtera valo de la larmoj en la eternan Patrujon.

En la profunda humileco, spite de grandega ĉagreno pro la forpaso de nia karega kunfrato, kolego kaj sacerdoto, ni kliniĝu antaŭ la volo de Dio, kiu ĉi-marde plenumiĝis.

Pastron Duilion Magnani ni konas kiel tre fervoran servanton de Kristo, nelacigeblan heroldon de Ĝoja Mesaĝo – la Evangelio – ne nur al siaj samlandanoj, sed ankaŭ ekster sia patrujo helpe de Internacia Lingvo Esperanto. Multajn jarojn li plenumadis prezidantan funkcion de Internacia Katolika

Unuiĝo Esperantista. Kiel prezidanto de tiu ĉi internacia katolika organizaĵo li per sia fervora agado sukcesis atingi gravajn celojn, kies fruktojn la katolika tutmonda esperantistaro ĝis nun utiligas.

Kiel ni perpreĝe akompanis la karegan pastron Duilion dum lia kalvaria vo-



*Giovanni Daminelli legas la mesaĝon de la prezidanto de IKUE (foto de Giuliano Rocchi)*

jo postsekvanta Jesuon Kriston, tiel ni plu memoros lin en la preĝoj, elpetante al li de la Dia Mizerikordo eternan ĉielan feliĉon.

Nome de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj nome de ĉiuj katolikaj esperantistoj, kiuj amis pastron Duilion, mi esprimas sinceran kaj profundan kondolencon.

Nia karega pastro Duilio, mi dankegas vin por ĉiuj bonoj, kiujn vi tiel abunde dum via surtera vivo realigadis, kaj mi aliĝas al ĉiuj, kiuj vin perpreĝe akompanas: Ripozon eternan donu al vi, pastro Duilio, la Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al vi, vi ripozu en la paco. Amen.

*Miloslav Švábek, Prezidanto de IKUE*

## Mesaĝo de la ĝenerala sekretario de IKUE

Karegaj Fratoj kaj Fratinoj,

mi ne scias ĉu ĉi tiuj malmultaj vortoj atingos la deziratan celon atesti la doloron, la amon, la fratan partoprenon, havigi al la Familianoj kaj al Via Komunumo la ameman ĉirkaŭbrakon de ĉiuj tiuj esperantistoj, kiuj deziris esti ĉie tie persone, sed kiuj estis malebligataj, ĉu pro distanco, ĉu pro laboraj devoj kaj kelkaj ankaŭ pro troa, forta emocio.

Multaj, eĉ ĉiuj, kiuj konis pastron Duilio'n deziris ĉeesti ĉi tie por doni la lastan saluton kaj partopreni en la prope-ta preĝo por la animo de la amata pastro.

Nian doloron mildigas la kredo kaj tamen ni spertas la maldolĉecon de ĉi tiu disiĝo. Sed donas al ni konsolon la rememoro pri ĉi tiu kara figuro de pastro. Aparte, dum la lastaj penigaj vivesemajnoj de pastro Duilio nin subtenis la ondo da amo kaj spirita proksimeco, kiu, mi dirus, “renversis“ la vivon de la esperantistaj asocioj.

La esperantistaj katolikoj travivis la lastajn semajnojn spirite ĉeestantaj ĉe lia lito en la hospitalo, per la enmemiĝo en mirinda ĉeno de preĝoj, kiu en la tuta mondo meminiĉiate komenciĝis post la unuaj informoj pri la malboniĝo de lia sanstato.

Oni preĝis ĉie: en Latinameriko, en la fora Novzelando, en Azio, en la tuta Eŭropo, sed ĉefe en tiu Afriko, kiu estis en la koro de pastro Duilio kaj kie multaj amis kaj amas lin, taksante sin liaj spiritaj gefiloj. La retroŝtaj adresoj, la poŝtkestoj de la esperantistaj asocioj pleniĝis per mesaĝoj: ĉiuj deziris sciigi al pastro Duilio, ke ili estas kun li, certigi al li sian seninterrompan preĝadon.

La esprimoj de homa solidareco alvenis ankaŭ el nekristanoj kaj nekredantoj. El iliaj vortoj – esprimitaj laŭ la respektiva kredo aŭ filozofio – ni ĉerpis la konfirmon pri la fakto, ke en sia vivo kaj agado pastro Duilio distingiĝis per forta evangelia atesto.

Li estis konvinkita subtenanto de Esperanto kiel rimedo por la evangelizado, la justeco kaj la frateco. Ankoraŭ antaŭ malmultaj monatoj – kvankam konscia pri sia malsano – pastro Duilio estis plena je vivo, tute okupita realigi programojn, ĉiam dezirante, ke liaj verkoj daŭru laŭ la granda kristana kaj esperantista fervoro, kiu karakterizis lin. En unu el siaj lastaj mesaĝoj, responde al la kontaktoj kun la ĉefepiskopo de Habano por la celebros de la Meso en Esperanto dum la monda kongreso de la esperantistoj en Kubo li skri-

bis: “Karega, mi estas malsana, sed kiam mi aŭskultas ĉi tiujn esperantistajn informojn mi reanimiĝas“. Kaj li daŭre instigis nin labori por la komunikado inter la popoloj, ĉar – li skribis al ni – ankaŭ tio estas parto de la “homa promocio“ kaj, se ni deziras paroli kristane, de “karitato“. Nome, respekti la neforigeblajn rajtojn

nome de la redakcianoj de la E-elsendo de Radio Vatikana, kiuj pretigas por la hodiaŭa vespero specialan elsendon rememore pri pastro Duilio, mi esprimas la plej profundan kristanan partoprenon kaj kondolencon unue al la Familianoj, al la Komunumo de San Giuliano Mare. Al la Eklezio en Rimini mi esprimas la ad-



*Ĉirkaŭ la ĉerko, atende de la transporto al la tombejo de Riccione.  
Fone, la benanta statuo de Papo Johano Paŭlo la 2a*

de la persono. Kaj li memorigis al ni, ke la respekto de la denaska lingvo esprimas la “identecon“ kaj la “dignon“ pli ol ĉiu alia homa rajto.

Ĝuste en tiuj tagoj komenciĝis abrupte lia malrapida supreniro al la kalvario de lia sinofero.

Karaj Fratoj kaj Fratinoj, ennome de IKUE, kies prezidanto pastro Duilio estis dum multaj jaroj, ennome de ĝiaj naciaj sekcioj, aparte de tiu itala, kaj en-

miron de ĉiuj esperantistoj, ĉar ĝi havis tiom belan figuron de pastro.

Kaj fine mi sentas la devon diri dankon al pastro Duilio, ĉar li gvidis – kaj ankaŭ foje instigegis nin prave dum niaj momentoj de moleco – laŭ la vojo al frata kunuleco, al karitato, al espero, laŭ pli kaj pli misiista elano, por pli kaj pli labori por la Regno de Dio. Ĉi tiu lia amo ne malaperos pro lia morto. Dankon pastro Duilio.

*Carlo Sarandrea*



## MIAJ REMEMOROJ PRI PASTRO DUILIO MAGNANI

Mia unua persona kontakto kun pastro Duilio Magnani – tiama prezidanto de IKUE, okazis en la jaro 1993. Dum pli antaŭa periodo ekzistis inter ni oftaj korespondkontaktoj. La renkontiĝo okazis en Slovakio en la urbo Žilina. Jen la koncerna raporto, kiu aperis en la revuo de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio n-ro 2/1993:

La 20-an de aprilo okazis renkontiĝo de reprezentantoj de la IKUE-sekcioj slovaka kaj la ĉeĥa en urbo Žilina kun la prezidanto de IKUE pastro Duilio Magnani. Celo de la peraŭtobusa vojaĝo de itala grupo el Rimini estis Pollando kaj ĉefe Ukrainio.

La Ĉeĥan IKUE-Sekcion reprezentis frato Miloslav Šváček kaj la Slovakian gefratoj Martin Majtán, Marta Kepeňová kaj Magda Feifičová. Dum la tagmanĝo en restoracio Slovacia estis preparolitaj aktualaĵoj de la IKUE-movado. La prezidanto anoncis al ni ne nur ĝojigan informon pri prezidantiĝo de la ĉefepiskopo Mons. D-ro Miloslav Vlč de la Konsilio de la Episkoparaj Konferencoj de Eŭropo, sed li informis ankaŭ pri problemoj, kiuj malhelpis regulan aperadon de la revuo Espero Katolika. Liadire estis faritaj paŝoj por reaperado de la revuo, kiu ĵus estas presata.

Posttagmeze okazis en la paroĥa preĝejo Sankta Meso celebra de tri pastroj el Italio, kaj post ĝi daŭrigis la itala grupo en la vojaĝo al Pollando, al Krakovo. Dumvoje al landlima trairejo en Český Těšín estis intervjuita frato Šváček, kiu akompanis la grupon ĝis tiu ĉi loko. La italajn gefratojn interesis aktualaĵoj el samtempa eklezia kaj politika sferoj en Slovakio kaj Ĉeĥio.

Ni esperas, ke la italajn gefratojn akompanis la sama bonhumoro kiel en Žilina, tiel dum ĉiuj tagoj de ilia eksterlanda restado.

Patro D. Magnani sendis bondezirojn kaj salutojn al la IKUE-anoj en Ĉeĥio kaj Slovakio kaj al ĉiuj legantoj de Dio Benu:

*“Okaze de vizito en Žilina mi ĝoje kaj frate salutas kaj bondeziras ĉiujn gelegantojn de Dio Benu kaj ĉiujn IKUE-anojn en Slovakio kaj Ĉeĥa Respubliko. La Virgulino Maria gardu nin ĉiujn!”*

*Benas Duilio Magnani. Žilina la 20-an de aprilo 1993”.*

Plua renkonto kun pastro Duilio okazis en Ĉeĥio en la urbo Olomouc en la jaro 1995 dum la 48-a Kongreso de IKUE, kiun frunte de la italaj partoprenantoj krom pastro Duilio ankaŭ partoprenis lia episkopo Mons. Giovanni Locatelli. Post falo de ruĝa drako – la komunismo - povis denove post 59 jaroj okazi la IKUE-kongreso en Ĉeĥio. Mi transprenis la

taskon de la ĉefa aranĝanto de la kongreso. Tiam mi petis la Virgulinon Maria Nian Esperon pri la helpo. Mi donis al Ŝi promeson, ke se la kongreso sukcesos, mi realigos mian dankan pilgrimon al Fatimo, por Ŝin danki, sed nesciante, kiel mi solvos la finanĉan problemon ligitan al la pilgrimo. Jes, la kongreso bonsukcesis, do estis antaŭ mi la devo plenumi la

son donitan al la Virgulino Maria. Fine de la kongreso trafis min neimagebla surprizo. Pastro Duilio enmanigis al mi



*Pastro Duilio Magnani transdonanta la esperantlingvajn Meslibron kaj Legafaron al la Kardinalo Miloslav Vlk en Olomouc*

koverton kun donaco de la italaj kongresanoj. En ĝi estis precize la monsumo bezonata por realigo de la pilgrimo. Tia surpriza momento certe estis instigita de la Virgulino Maria pro mia helpofido al Ŝi. Sekvan jaron mi do realigis la pilgrimon al Fatimo perbuse kun ceteraj, por mi tute nekonataj, pilgrimantoj. Antaŭ la ferma Sankta Meso en la Kapelo de Aperoĵoj de la Virgulino Maria mi petis la Dipatrinon pri la signo, ĉu per tiu ĉi mia pilgrimo estis plenumita mia promeso al Ŝi donita. Mi al Ŝi proponis, ke eble kiel la signo povus esti elekto de mi por legi la legafon. Mi sidis inter la ceteraj pilgrimantoj atendanta la Sanktan Meson. Antaŭ ĝia

komenco venis la pastro, montris per fingro al mi dirante: “Vi legos la legafon.” Ho, kia ĝojo plenigis min, kiel klara signo de la Fatima Madono. Do tiom koncerne la renkontiĝon kun la pastro Duilio dumkongrese en la jaro 1995.

En la aŭgusto 1997 komenciĝis jubilea 50-a kongreso de IKUE en Romo kaj Rimini. El Ĉeĥio okazis busvojaĝo de la kongresanoj unue al la eterna urbo Romo. Dum la merkreda tago la 3-an de septembro kulminis programo de la unua kongresa parto en Romo. Ĉiuj kongresanoj partoprenis ĝeneralan aŭdiencon de la Papo sur la Placo de Sankta Petro. La Sankta Patro bonvenigis la ĉeestantaj kongresanojn per jenaj vortoj:

“Mi ĝojas bonvenigi la responsulojn de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, engaĝitajn en sia Kvindeka Kongreso.

Karegaj, la temo de via renkonto renprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de universaleco, kiu



*Pastro Duilio preta dum la aŭdienco por transdoni al la Papo la esperantlingvajn Meslibron kaj Legafaron.*



*La ĉefa mozaiko kaj rozvitraro kun dulingvaj skribaĵoj en la itala kaj Esperanta lingvoj*

estas ĉe la bazo de la lingvo, kiun vi kulturas.”

Tiam tri reprezentantoj de IKUE – D-ro Antonio de Salvo – la prezidanto, Sac. Duilio Magnani – la honora prezidanto kaj Miloslav Šváček – la estonta prezidanto, havis la honoron dum la aŭdienco ĉeesti proksime ĉe la Papo. Pastro Duilio Magnani transdonis al la Papo nome de IKUE-anoj donacon – blanke binditajn Meslibron kaj Legaĵaron en Esperanto.

La dua parto de la kongreso okazis en Rimini en paroĥo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo en la urboparto San Giuliano Mare, en kiu plenumis servojn de paroĥestro karega Honora Prezidanto de IKUE sac. Duilio Magnani, kiu ofereme laboregis por sukceso de la dua kongresa parto. La tiea preĝejo agrable mirigis la kongresanojn per tre belaj kaj modernaj mozaikoj. Precipe grava estas mozaiko kaj rozvitraro kun dulingvaj skribaĵoj, en la itala kaj en Esperanto. Ĝi bildigas historian decidon de la Papo Johano Paŭlo la 2-a enkonduki Esperanton en la katolikan liturgion per la aprobo de Roma Meslibro kaj ankaŭ unuan paskan saluton de la

Papo en Esperanto: “Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta” la 3.4.1994.

Ankoraŭ alia raraĵo mirigis nin –



monumento de Patro Pio el Pietrelcina, staranta apud la preĝejo ankaŭ danke al grandega oferemo de sac. Duilio Magnani. Li estis spirita filo de Patro Pio



el Pietrelcina, kiun li kelkfoje vizitis kaj rakonte alproksimigis al ni tiujn ĉi siajn vizitojn.

Tre kortuŝaj estis la kantadoj post la fino de la Sanktaj Mesoj en la preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo, en kiu pastro Duilio praktikadis sian pastran servon; temas pri la kantoj “Madono” kaj “Mi vin dankas, ho mia Sinjoro”.

En la Jubilea Jaro 2000 okazis la 53-a Kongreso de IKUE komence de septembro denove en la urbo Rimini kun pilgrima vizito de Romo. La ĉefaj kaj slovakaj kongresanoj perbuse sabate atingis kongreslokon en ĉemara urboparto de Rimini, San Giuliano Mare. Bonvenigis ilin paroĥestro Sac. Duilio Magnani – la Honora Prezidanto de IKUE. Ĉiuj ĉefaj kaj slovakaj kongresanoj estis loĝigitaj en Hotelo Villa de Anna, situanta nur kelkajn metrojn de la kongresloko, preskaŭ kontraŭ la preĝejo de sanktaj Johano kaj

Paŭlo, kiun oni kiel mondan unikaĵon alinomas “Katedralo de la Esperantistoj”.

La kongreso danke al gastiganta paroĥo de la Sanktaj Johano kaj Paŭlo kaj ĝia paroĥestro pastro Duilio Magnani fariĝis denove neforgesebla travivaĵo.

En la revuo de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio, kiu raportis pri la kongreso, oni povas legi jenajn konkludajn vortojn: “Lastan tagmanĝon en Hotelo Villa de Anna en Rimini ĉeestis ankaŭ nia karega kaj ofe-



rema frato kaj pastro Duilio Magnani. Post Dio apartenas niaj multmultaj dan-koj precipe al li kaj al liaj paroĥanoj, kiuj denove disponigis la paroĥon por la kongreso de la katolikaj esperantistoj.”

En la jaro 2003 okazis jam la trian fojon la kongreso en Rimini – ĉi-foje ĝi estis la 16-a Ekumena Kongreso (56-a de IKUE kaj 53-a de KELI). Denove la ĉefaj kaj slovakaj kongresanoj vojaĝis kune perbuse, sed nune tra aŭstria pilgrimloko Mariazell. Dum la vojaĝa tago okazis granda pluvego, kiu malebligis trafikon tra landlima trapasejo de la aŭstria-itala landlimo. Multajn horojn ni estis devintaj atendi kaj finfine atingi Italion tra Slovenio. La urbon Rimini ni atingis noktomeze. Malgraŭ la 13-hora malfruiĝo nin pastro Duilio atendis kaj loĝigis en la Hotelo Villa de Anna.


Kadre de la kongresa restado pastro Duilio Magnani erudicie klarigis al la kongresanoj ĉiujn detalaĵojn de la mozaikoj liamerite vaste ornamantaj la preĝejon de la Sanktaj Johano kaj Paŭlo, kio estas fakte tutmonda raraĵo.

Pastro Duilio Magnani lanĉis en la jaro 2005 iniciaton por starigi monumenton omaĝe al la kara Papo Johano Paŭlo la Dua sur la preĝeja placo de la “Katedralo de Esperantistoj” en Rimini fronte al monumento de Patro Pio. Estas konate, ke por la karmemora Papo Johano Paŭlo la 2-a Esperanto fariĝis ne nur lingvo “aprobata”, sed ankaŭ parolata de la katolika Eklezio. Tial li prave meritis de la katolikaj esperantistoj, konservi daŭran rememoron pri li. La 28-an de junio 2005 okazis liturgio por la komenco de lia kanona beatig-proceso. La inaŭguro de la monumento estis planita okaze de la unua datreveno de lia morto, la 2-an de aprilo 2006, kio estis la plej oportuna okazo por tio.

La bronza statuo altas 180 cm kaj verkis ĝin la sama artisto de la statuo de

Patro Pio. Ĉar la Papo famis pri sia lingva kapableco kaj substrekis etnajn, naciajn kaj planitan internacian idiomojn, piede de la statuo la skulptisto pretigis memorigan tabulon pri la tri lingvoj necesaj por la interhoma interkompreniĝo: t.e. la etna, la nacia kaj la internacia. Sokle de la piedestala kolumno oni skribis mozaike: “Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta, 03.04.1994”.

Kaj denove septembre 2008 oni kon-



gresis en la urbo Rimini, samloke en la urboparto San Giuliano Mare, kiu tiam gastigis la 61-an Kongreson de IKUE. Tiujara kongreso estis speciale grava, ĉar ĝi ligiĝis kun du gravaj jubileoj: la vivjubileo – la okdekjariĝo de la multmerita Honora Prezidanto de IKUE pastro Duilio Magnani kaj Centjariĝo de Esperanto en Rimini.

En sia salutvorto la pastro Duilio tiam diris: “Karegaj gefratoj kaj IKUE-anoj, ni konscias esti ‘malgranda grego’. Tamen ne timu! Por la vero kaj la justeco ĉiam malmultaj homoj sin devigas batali kaj



*Pastro Duilio interparolanta kun sia episkopo Mons. Francesco Lambiasi*

pagi persone. La plimulto preferas la maljustajn kvieton kaj pacon. Ankaŭ nia ama-ta Papo Johano Paŭlo la 2-a, la granda komunikisto, kvankam rekonata poligloto kaj latinisto, ne timis batali, por ke Esperanto eniru la katolikan liturgion, kaj eĉ en la oficiala alparolo al la tuta mondo laŭ la formulo “Urbi et Orbi” li ĝin uzadis. Signojn de tiuj historiaj faktoj vi admiros mozaikigitajn en la E-katedralo. Ne timu! La Sankta Spirito, kiam la Apostolo Petro alparolis dumpentekoste en sia regiona lingvo, preferis mirakli per la multnaciaj lingvoj ol uzi la tiamajn hegemoniajn lingvojn (la latinan, la grekan kaj la lingvon de la Templo). Ne timu, ĉar la Sankta Spirito, malgraŭ ĉio, ade inspiras kaj gvidas sian Eklezion. Kiam ankaŭ la lingva justeco maturiĝos en la konsciencoj de la altranguloj kaj de la Dia Popolo, certe ĝi triumfos. Tiam IKUE malaperos kiel servisto neutila. Por ne timi la batalon kontraŭ la lingva diskriminacio en la mondo kaj en la Eklezio, ni bezonas la Dian forton, la forton kaj la lumon de la Sankta Spirito, la konvinkigan potencon de la Dia Vorto kaj de la Eŭkaristio ankaŭ ĉi-kampe.“

Tiu ĉi bonveniga alparolo estu por ni,

la katolikaj esperantistoj, liaj kvazaŭ testamentaj vortoj. Kelkfoje mi dum tiu ĉi kongreso kun li interparolis. Estis videble, ke li suferas, tamen li laŭ siaj eblecoj plu nelacigeble plenumadis siajn pastrajn animzorgajn servojn en la paroĥo kaj siajn bonfarajn aktivadojn en Afriko, kiun li ankoraŭ en la jaro 2009 lastan fojon vizitis.

Konklude de tiuj ĉi kelkaj rememoraj paĝoj mi volas esprimi mian estimon al la mortinta patro Duilio. Li estu por ni vivmodelo por la nelacigebla laborado, por konstanta konservo de la optimismo spite de diversaj malfacilaj obstakloj, kiujn kuraĝe kapablis ĉiam dum sia vivo sukcese kun helpo de Dio spiti la karega pastro Duilio. La bona kaj fidela servisto certe ricevis merititan rekompencan en la Ĉiela Regno, de kie li helpadu kun la ĉielaj patronoj de IKUE kaj kun ĉiuj sanktuloj – iamaj esperantistoj al ni, kiuj estante en ĉi tiu valo de larnoj ĉiutage ankaŭ proksimiĝas al renkonto kun ili en la eterna Patrujo.

*Miloslav Šváček*

Pastro Duilio Magnani vivis 81 jarojn, 10 monatojn kaj 9 tagojn, naskiĝinte la 11-an de junio 1928. Li enskribiĝis en historion de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista per oraj literoj. Kun dankemo ankaŭ la ĉeĥaj IKUE-anoj rememoros perpreĝe la pastron Duilion, kiu dum la periodo, kiam komunistaj regantoj likvidis la Ĉeĥan IKUE-Sekcion kaj malpermesis importi de eksterlande la religian literaturon, inter kiu estis ankaŭ revuo *Espero Katolika*, ankaŭ liastrebe tamen estis trovita kanalo, per kiu la malpermesita karega revuo atingis la legantojn en tiam Ĉeĥoslovakio. Li restu enskribita en niaj korjoj!



## P. MANUEL CASANOVES (1927-2010)

*La 15-an de aprilo 2010 forpasis Pastro Manuel. Li forlasis nin neatendite, kvankam lia sanstato estis sufiĉe malbona. DM de IKUE, longatempe LR, komitatano, aktiva dum pluraj jardekoj, klera kaj ekvilibra. EK aparte mencias lian kuraĝan prelegon dum la IKUE-kongreso en Valencio 1964 (plene dum la frankisma epoko) [http://www.esperokatolika.org/ek19611965/ek1964\\_10.htm#3](http://www.esperokatolika.org/ek19611965/ek1964_10.htm#3). Eble en nia movado ne multaj scias, ke li estis fama pledanto por la homaj kaj lingvaj rajtoj, pioniro. La rememoron pri li, kun detala biografio, ni ĉerpas el la prediko, kiun **P. MÀxim Muñoz Duran**, provincestro de la kletana ordeno en Katalunio, faris dum la funebra rito en la sanktejo Koro de Maria en Barcelono la 16.04.2010 kaj kies tekston li afable kaj kun nia dankemo havigis al ni. Koran dankon al **Ramon Perera**, kiu peris kontaktojn kun la kletana superulo kaj al la iama lernanto de P. Casanoves, **Abel Montagut**, kiu reviziis nian redakcian tradukon el la katalun-lingva teksto.*

Ni celebras la Eŭkaristion por la adiaŭo al Pastro Manuel kaj per ĝi ni volas danki pro la donaco de la nova vivo, kiun ni havas dank' al la resurektinta Kristo kaj dank' al Lia ĉeesto inter ni. Mi ne celas preterlasi la legitajn bibliajn tekstojn (kio estus liturgia peko, kiun p. Manuel ne pardonus al mi): pri ili mi faros komenton, sed antaŭe permesu, ke mi parolu pri lia vivo. La vivo de kristano neniam ĉesas esti bona komentario kaj apliko en la nuntempo de la Parolo de Dio.

Vere estas, ke malfacilas resumi la riĉecon de la vivo de p. Manuel, ĉar interalie li postlasis al ni amason da verkoj, ĉiuj manskribitaj per sia bela kaligrafio. Nur lia taglibro, en kiu li preskaŭ ĉiutage zorgeme notis ĉion, kio okazis kaj kio estis grava, konsistas el 34 kajeroj kun skribo klare legebla, sed vere densa. Li postlasis imponan heredaĵon, kiun oni devos tre atente studi, ĉar ĝi proponas eksterordinaran socian, kulturalan kaj eklezian ateston pri nia lando, nia Eklezio kaj nia mondo.

Li naskiĝis en Olesa de Montserrat, la

31-an de aŭgusto 1927; tri jarojn poste lia familio translokiĝis al Barcelono, en straton Sant Antoni M. Claret n-ro 30. En la urbo li spertis kvinfoje ŝanĝon de loĝejo kaj li travivis la tutan militon en tiu ĉi urbo, kio, ni facile povas imagi, postlasis profundan impreson en li.

En sia familio li spiradis etoson de granda religiemo kaj de granda ŝato por la katalunaj lingvo kaj kulturo, sed ankaŭ de universala malfermiteco. Ni scias, ke li eklernis Esperanton en sia hejmo. Detalon pri lia kristaneco radikiĝinta en nia tero ni ekkonas el la fakto, ke li kaj lia fratino ricevis la unuan Komunion en Montserrat. Kaj lia familio havis kontaktojn kun gravuloj. Sufiĉas diri, ke gravan problemon ĉe lia kruro priflegis D-ro Carrasco i Formiguera<sup>1</sup>, kaj liajn tonsilojn operaciis D-ro Lluís Vila d'Abadal<sup>2</sup>.

Post la frekventado de diversaj lernejoj li fine atingis la 10-an de oktobro 1939 ĉi tiun lernejon Claret, en kiu li malkovris sian vokiĝon fariĝi kletano. Efektive la postan jaron (1940) li eniris la seminarion

<sup>1</sup> Manuel Carrasco i Formiguera (Barcelono, 1890 - Burgos, 09.04.1938) estis advokato kaj kataluna kristandemokrata politikisto, ekzekutita dum la interna milito de Hispanio.

<sup>2</sup> Lluís Vila d'Abadal (Vic, 1889 - Barcelono, 10.09.1937) estis politikisto kaj kuracisto, fondinto de la Demokratia Unuiĝo de Katalunio. Li mortis dum la hispana interna milito.

de Cervera. Li poste transiris al la seminario de Alagón, en kiu li klopodis ne perdi sian denaskan lingvon, la katalunan, malgraŭ la tiuepoke reganta hispanlingva etoso. Plurfoje p. Manuel rakontis al ni, ke la kolegoj en Alagón diradis al li: “Vi konstatos, ke vi forgesas la katalunan [lingvon]”, kaj ke li respondis preskaŭ kolere: “Mi ne perdos mian lingvon”, kaj efektive li faris ĉion eblan tiucele.

Li transiris poste al Vic por la novicado kaj tie li eldiris la unuajn votojn de klaretana misiisto la 15-an de aŭgusto 1944.

Li kompletigis siajn studojn pri filozofio en Solsona (1944-1947) kaj tiujn pri teologio en Valls (1947-1951). La somerojn de 1950 kaj 1951 li pasigas en Montgat, por helpi pastron Ribera, por la pretigo de lia fama Meslibro eldonita de Editorial Regina. Komencis disvolviĝi unu el liaj kapabloj: beletro kaj eldonado.

La 17-an de junio 1951 li ricevis la pastran ordinon en la kapelo de la Seminario de Taragono el la manoj de kard. Benjamín de Arriba y Castro. Li skribis en sia taglibro, ke kune kun li pastrigis Joan Martí Alanis, estonta episkopo de Urgell. Tiun ĝojan momenton akompanis la ĉeesto de liaj gepatroj, de lia fratino Pilar kun ŝia edzo Josep.

Kelkajn tagojn poste, la 29-an de junio 1951, okazas lia primica Meso en la preĝejo “Koro de Maria” en Gràcia (Barcelono). Dum la nuna Eŭkaristio ni uzos la saman kalikon, kiun li ekuzis tiuokaze.

Septembre de 1951 liaj superuloj sendis lin al Solsona, por esti instruisto pri muziko, angla lingvo kaj sciencoj ... “Sen iu ajn antaŭa prepariĝo”, skribis p. Manuel en sia taglibro, kaj tio sufiĉas, por ke ni ekkonu la perfektigemon de p. Manuel: malgraŭ siaj kapabloj kaj kompetento li neniam sentis sin sufiĉe preta por plenumi la ricevitaĵajn komisionojn, ĉefe rilate al instruado, kaj tamen li dediĉis multajn jarojn al ĉi tiu tasko en Solsona kaj poste en Valls, 1956-1960, kie

li instruis liturgion, gregorian ĉantadon kaj historion de la Eklezio.

En tiuj jaroj li kombinis instruadon kun sciencaj studoj ĉe la Supera lernejo de sankta muziko en Madrido, dum la someroj de 1953 ĝis 1955, kiam fine li ricevis la diplomon de instruisto pri gregoria ĉantado.

Ankoraŭ dum tiuj jaroj li plenumis diversajn pastrajn servojn: abundajn predikojn kaj paroĥajn helpojn. Li rememoris kun aparta kortuŝo sian prizorgon de la paroĥo en Montferri, kiun li efektivigis en la jaroj 1958-1961, anstataŭigante pastron Farnés, kiu vojaĝis al Romo kaj Parizo por studado. Antaŭ nelonge li havis la ĝojon viziti la sanktejon de la Virgulino de Montserrat en Montferri. Li tre deziris fari tiun viziton antaŭ ol morti kaj li povis realigi ĝin per komunuma vojaĝo. Ĝuste la gvidistino de la sanktejo diris, ke ŝi estis unu el la knabinoj de la paroĥa koruso, kiun li starigis, kaj ŝi rememoris lin kun varma simpatio.

Ankoraŭ dum tiu epoko li deziris kaj povis partopreni en la 35-a Internacia Eŭkaristia Kongreso okazinta en Barcelono majo kaj junio 1952, kaj aparte en pluraj liturgiaj kongresoj kaj en la “Naciaj kolokvoj pri liturgia diserva agado” (Albacete, Cuenca kaj Ciutat de Mallorca). Tutcerte li sentis sin tre engaĝita en la liturgia movado, kiu kondukis al la liturgia reformo de la 2-a Vatikana Koncilio. Li amis la liturgion, kiu, kiel li kutimis diri, estas multo plia ol la mesrubrikoj, al kiu oni ĝin reduktis. Liturgio kaj kantado por li konsistigis tutajn: en lia taglibro troviĝas sennombraj mencioj pri partoprenitaj solenaĵoj kaj li ĉiam substrekkis la kantitajn himnojn kaj kantojn. Li havis profundan sentivon ĉi-rilate.


Ĝuste en Valls, dum la jaroj 1959-1960, do plene dum la reĝimo de Franko, li instruis la katalunan lingvon en la tiea kulturdomo “*Centre de Lectura*”. Temas pri unu el liaj pasioj: amo, uzo, instruo, defendo de la propra lingvo: la kataluna. Poste, en Cervera kaj en



Lleida, dum la jaroj 1967 kaj 1968 li aranĝis kursojn de la kataluna por la korusanoj de “Orfeo Lleidatà” (por tiuj, kiuj celis fariĝi instruistoj) kaj en la Katedro pri la kataluna lingvo Samuel Gili Gaia (Aŭlo de Cervera) en la sidejo de “La Caixa”, kaj, jarojn poste, en Barcelono. Ĉe Eldonejo Claret li eldonis du libretojn, kiuj dum la epoko de Frankismo fariĝis fundamentaj por la praktikado kaj la instruado de la lingvo: “Escriuiu bé el català-II” (9-a eldono 1991) kaj “Parleu bé el català-II” (3-a eldono 1985).

En 1960 oni sendis lin al Britio: dum unu jaro en la kletana novicejo de Backwell li estis helpanto de la estro de la noviculoj; la duan jaron li estis en Highcliffe instruisto pri Sankta Skribo, historio de la Eklezio, hebrea lingvo, kaj, kompreneble, muziko kaj liturgio.

Tiuj estis tre gravaj jaroj en lia vivo. Ĝuante liberecon en demokratia lando, li gravajn kontaktojn kun elstaraj homoj de la kataluna rezistomovado en la ekzilo. Li plene malkovris la socialan doktrinon de la Eklezio kaj la Deklaracion pri la homaj rajtoj. Dum intervjuo publikigita de “New Fire” li deklaris: “La universalan Deklaracion pri la homaj rajtoj mi legis por la unua fojo en Britio, ĉar en nia lando multaj eĉ ne konis ĝian ekziston. Profitante eldonon de la encikliko “Pacem in terris” de Johano la 23-a, barcelona eldonejo presigis kiel apendicon de la teksto ĉiujn artikolojn de la Deklaracio, kaj oni bone ekkonis ĝin en Katalunio. Johano la 23-a en tiu encikliko de 1963 menciis la universalan Deklaracion pri la homaj rajtoj kiel “unu el la signoj de espero de tiu momento”. Alia granda malkovro estis tiu, kiu poste fariĝos Amnestio Internacia. En 1961 li legis en la ĵurnalo “The Observer” la artikolon: “La



forgesitaj prizonuloj”, verkita de katolika advokato Peter Benenson<sup>3</sup>. En la jam menciita intervjuo en “New Fire” p. Manuel memorigas kiel tiu teksto profunde tuŝis lin. Diras p. Manuel: “La ĉefa parto montris la fotojn de kelkaj el la malliberuloj. Oni tie klarigis: “malfermu ajnan tagon de la semajno vian ĵurnalon, kaj vi trovos informon, ke ie en la mondo iu homo estis enprizonigita, torturita aŭ ekzekutita, ĉar liaj opinioj aŭ lia religia kredo ne estas akcepteblaj por lia registaro. Ekzistas pluraj milionoj da tiaj personoj, kaj ili pli kaj pli multiĝas. Legante la ĵurnalon oni spertas senton de senpoveco. Sed se ĉi tiujn sentojn de repuŝo oni povus kunaktivigi en la tuta mondo por komuna agado, ni povus fari ion vere efikan”.

Pro tiu artikolo li ekkontaktis D-ron Benenson. Li sendis al li artikolon pri la kataluna situacio, ĉerpante ion el la parolado de D-ro Jordi Pujol<sup>4</sup> fronte al la militkonsiliĝo. La artikolo tre interesis la fondinton de Amnestio Internacia, kaj la trimonata revuo “Amnesty” publikigis ĝin la 11-an de majo

<sup>3</sup> Peter Benenson (31.07.1921 – 25.02.2005) estis brita advokato, paladeno de la homaj rajtoj, pro kiuj li starigis Amnestion Internacian en 1961.

<sup>4</sup> Jordi Pujol i Soley (Barcelono, 09.06.1930) estas politikisto de Katalunio, ekde 1980 ĝis 2003 prezidanto de la memstara registaro de Katalunio, Generalitat de Catalunya.

1962 sub la titolo “Kataluna protesto” sub la pseŭdonimo – mi kredas – Jordi Quatribarrat, per kiu li jam antaŭe sendis leteron pri la sama temo al la prestiĝa religia revuo “The Tablet”. La 12-an de marto 1962 li notis en sia taglibro: “Alvenis al mi la membrokarto de la movado Amnestio Internacia”.

Nome: p. Manuel, deirante de sia sentemo pri la digno, la konscienclibereco kaj la defendendaj rajtoj de la popoloj, trovis unuflanke konfirmon ĉi-rilatan en la papa Instruado kaj la eblecon alceligi konkretan agadon per movado Amnestio Internacia, kiu tiam eknaskiĝis. Denove en Katalunio kaj pro la malfermiteco estiĝinta post la morto de Franko li aktive partoprenis en la starigo de la sekcio de Amnestio en Hispanio kaj en Katalunio, kaj li akceptis fariĝi ties unua prezidanto en 1978. Se oni legas lian taglibron oni rimarkas la pasion kaj la energion, kiujn li dediĉis por la celo de la homaj rajtoj de unuopuloj kaj popoloj, pli konkrete por la katalunaj popolo kaj kulturo, pere de verkoj, prelegoj kaj diversaj agadoj.

Tion kompletigis alia el liaj pasioj: Esperanto kaj la movado de la universala frateco, kiu kunligiĝas kun ĝi, aktive partoprenante en la starigo de Kataluna

E-Asocio (KEA), kies unua prezidanto li estis ekde 1980 ĝis 1986. Li estis ankaŭ reprezentanto en Hispanio dum multaj jaroj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). La esperantista mondo malfermis al p. Manuel amason da spertoj kaj konoj tre interesaj, pri kiuj li multe ŝatis paroli.

Ni konstatas tial en p. Manuel ekzemplon de persono profunde radikiĝinta en sia kataluna identeco, samtempe malfermita al universaleco laŭ eksterordinara maniero, kaj ne nur por la kulturo, sed ankaŭ por la sociaj temoj kaj batalo por la homaj rajtoj.

Post reveno el Britio li estis instruisto en la klaretana Seminario de Cervera (1962-1968). Li instruis literaturon, katalunan, grekan, anglan lingvojn, muzikon kaj Esperanton.

Ekde 1968 oni sendis lin al la komunumo en la strato Llúria (Barcelono), kunligita kun la Eldonejo kaj Librovendejo “Claret”. La restado en tiu komunumo estis longdaŭra ĝis 1990 kaj tre intensa. Li kunigis la pastran agadon kun granda aktivado por la defendo kaj akcelo de la lingvo, la starigo de Amnestio Internacia en Katalunio kaj Hispanio, la partopreno en ĉiuspecaj debatoj, eventoj, verkoj kaj manifestoj favore al la katalunaj lingvo kaj kulturo kaj favore al la homaj



*El Simpozio omaĝe al P. Maksimiliano Maria Kolbe en Niepokalanów, Pollando, 1974. De maldekstre: P. Manuel Casanoves, P. Józef Zielonka, P. Ferdinando Longoni, P. Henryk Paruzel*

rajtoj, [kune kun] la eldona laboro. Ni povas menci, inter multaj aliaj iniciatoj, la apogon al la fondo de ĵurnalo “Avui” (Hodiaŭ) kaj la ligitecon kun la grupo “Sant Jordi” por la homaj rajtoj.

En 1990 oni sendis lin al Vic, kie li kultivis alian sian pasion, la historiajn esplorojn, aparte pri la vivo de p. Claret kaj de la klaretana Kongregacio. Dank’ al la konstantaj kaj profundaj esploroj de p. Manuel eblis malkovri gravajn aspektojn de la vivo de la Fondinto. Ekde 2004, kiam lia sanstato komencis signife malboniĝi, oni asignis lin al ĉi tiu komunumo en Gràcia (Barcelono). Inter la aferoj, kiujn lia sanstato permesis al li fari, estis la fidela cerebro de la ĉiutaga kaj dimanĉa Mesoj en ĉi tiu preĝejo de la sankta Koro de Maria.

Li multe suferis pro la malkresko de lia kapablo libere moviĝi, kio tamen ne forprenis de li la spiriton de scivolema esploranto, deziranta resti ĝisdatigita pri tio, kio okazas en la mondo de la kulturo kaj de la socio kaj de la Eklezio kataluna kaj universala. Ĝuste antaŭ nelonge, dum interparolo li diris al mi, ke li havas tri aŭ kvar kurantajn esplorojn, kiuj blokiĝis, ĉar li ne povis iri al la arkivo kaj ne scias, ĉu estas dokumentoj por analizi.

Ĉi tiun tutan sentemon p. Manuel travivis per profunda kristana kredo kaj sia klaretana vokiĝo. Granda enamiĝinto je p. Claret, li imitis lin koncerne la radikiĝon en la teritorio kaj la elano al universaleco, aparte por la akcelo de la Evangelio de justeco, paco kaj libereco. Temis pri kredo, kiu havis intensajn momentojn dum la liturgio nedisigeble unuigita kun la muziko. Fragmento de unu lia Kristnaska prediko bone esprimas per kiu spirito li travivis la liturgion kaj la koncilian reformon: “Hodiaŭ, malgraŭ la kristnaska etoso, ni ne fiksu nian atenton je okazaĵoj, bildoj de la Kripo aŭ de la Paŝtistoj

aŭ je la aliaj historiaj aŭ legendaj momentoj pri la Infano Jesuo, sed ni kontemplantu la profundecon kaj grandiozecon de la Mistero. Aperas grava kontrasto inter la malrapida kaj kontempla legado de la Prologo de Sankta Johano fronte al la hasto kaj malatento, per kiu ni eldiris en la latina lingvo ĉi tiujn samajn vortojn je la fino de ĉiu Meso. Estas pli bone nun unufoje, ol antaŭe ĉiutage”.

Kaj sekvante la fadenon de liaj predikoj ni povas ekkapti sperton de kristanismo tre kunligitan kun la sociaj kaj eĉ politikaj problemoj, kiujn ni travivas. La unuan leĝaĵon, kiun hodiaŭ ni aŭskultis, li komentis tiel: “La unua leĝaĵo priskribas la komencan kristanan komunumon. Ĝi povus aspekti komunismo, sed ĝi estas komunumismo. Kundividita solidareco, unu koro, unu animo. Kaj ankaŭ unu monsako, unu administrado komuna. Solidareca helpo, Solidareca Kunligo, Frateco (kompensa kaso inter riĉaj kaj malriĉaj komunumoj), kampanjo por alceligo de la 0,7% de la interna brutta produktado favore al triamondaj landoj, ktp. ktp. Ni kristanoj ne estas tiuj, kiuj principe kaj super ĉio, devas defendi la proprieton (“Populorum progressio”). Jen antagonismaj kazoj: tiu de deputito Jiménez Fernández, kristandemokrata profesoro de Seviljo, kiu sisteme proponis al la hispana parlamento agraran reformon inspiritan de la papaj enciklikoj; vidalvide al la kontraŭstaro de tradiciisto Lamamié de Clairac<sup>5</sup>: al la defendantoj de la propio tute ne gravas ĉu oni forprenas ĝin en la nomo de Stalin aŭ de la Papo; ni devos deklari nin skismanoj”.

Kaj pri la Evangelio, kiun ni proklamis, p. Manuel skribis en skemo de prediko: “Simpleco, humileco, malriĉeco, la etuloj, la infanoj, la lacigitaj, la subpremitaj. Estas granda konsolo aŭskulti la lastajn vortojn de la Evangelio en mondo, en kiu ŝajne

---

<sup>5</sup> José María Lamamié de Clairac y de la Colina (Salamanca, 16.08.1887, samloke, 27.04.1956), advokato kaj politikisto.

ĉiuj pensas nur al si mem, sen zorgi pri la aliaj. Vidu la kunpuŝojn por enpremiĝi en la metroon, en trajnon aŭ en aŭtobuson; la hastaj kuroj por esti la unuaj, okaze de rabatoj en superbazaroj. Estas konsolodone aŭskulti, ke ekzistas iu, kiu prizorgas nin kaj liveras ripozon kaj mildigon”.

En alia prediko, kiu estas bona komentario ĉu pri la Evangelio ĉu pri la psalmo, kiujn ni legis, li asertas: “Jesuo, la centro de ĉio, la sola nemalhavebla, la sola je kiu eblas fidi, la sola, kiu neniam seniluziigos nin. Kontraste kun multaj aliaj providencaj homoj kaj savantoj, estroj de politiko, de sindikato, de arto, de sporto, kiuj lasas nin seniluziigitaj, post kiam ni donis nian fidon, niajn voĉdonojn al ili... Jesuo estas nia bona paŝtisto... Sed atentu kontraŭ la ideo de gregeco kaj amasiĝo. Ni vivas epokon de senpersonigo sub la influo de la grandaj konzernoj, kiuj ĉion fabrikas kaj serie muntas grandkvante, kaŭzante la ruinon de la eta kaj mezgranda industrioj kaj de metiarto... Jesuo, male, konas nin, amas nin kaj donas la vivon al ĉiu el ni, unuope – ni neniam estas [por Li] anonimuloj”.

Mi finas per kelkaj vortoj dediĉitaj de p. Manuel al la espero, kiuj estas signifaj ankaŭ pri tia spirita sento ĉiam en rilato kun la sociaj eventoj. Li aludis ĉeftitolon de la ĵurnalo “Avui”, kiun li legis en gazetkiosko: «Estas ankoraŭ espero». “Pormomente mi sentis kvazaŭ, ke unu el la precipaj temoj de la hodiaŭa Meso fariĝis frontpaĝa informo de la ĵurnaloj, sed poste, en alia gazetkiosko [mi legis]: «dum restas footballigo, restas espero»”. Komplemente li proponis la

eblan starigon de ‘Sankta Kongregacio por la Defendo de la Espero’, simila al tiu kiu jam ekzistas por la Doktrino de la Kredo kaj por la Disvastigo de la Kredo; aldonante: Ĝojo – espero. Diskonigi nian esperon, sed ĉiam humile kaj respektoplene. Kelkaj respondoj estas ofendaj, malproksimigas el ni la demandanton. Homoj de espero fronte al mondo senespera. Ĝojradiaj homoj fronte al malĝoja mondo. ‘Ni ne videbligas ĝin!’ (diras rolulo en romano de Bernanos<sup>6</sup>, observante kristanojn, kiuj eliras el Meso). Vortoj similaj al tiuj de Maragall (en “l’Església Cremada”, La preĝejo bruligita)<sup>7</sup>: ‘Kiel vi povas enui aŭ endormiĝi, se antaŭ vi okazas la plej potenca afero en la mondo...?’”.

Kaj la menciitan intervjuon en ĵurnalo “New Fire” p. Manuel Casanoves finis per jena esperplena mesaĝo: “Signo de espero estas la fakto, ke ni [kristanoj] daŭre ekzistas, ke la politikaj, amaskomunikilaj kaj diktaturaj povoj, la materiismo kaj la konsumismo – por citi nur kelkajn ekzemplojn – ankoraŭ ne forvoris nin, kaj ni konservas nian spiriton, specifajn idealojn. Tio donas esperon kaj diras al ni, ke ni povas venki la obstaklojn. Malgraŭ ĉiuj rubaĵoj en nia mondo ankoraŭ elflosas homeca spirito, kaj kial ni ne nomu ĝin: kristana spirito?”.

Restas do al ni ĉi tiu mesaĝo de amo al Jesuo Kristo – en kiu ni fidas, ke li jam ripozas – kaj de espero, kiun li vidas jam kronita enirante en la definitivan Regnon de la amo de la Patro. De tie li akompanu nin, kiuj ankoraŭ faras nian vojon sur nia tero kaj en nia socio. **P. Màxim Muñoz Duran**

<sup>6</sup> Georges Bernanos (Parizo, 20.02.1888 - Neuilly-sur-Seine, 05.07.1948) estis franca verkisto.

<sup>7</sup> Joan Maragall i Gorina (Barcelono, 10.10.1860 – samloke, 20.12.1911) estis kataluna poeto, aliĝinta al la movado de “modernismo”. La menciita verko (“l’Església Cremada”) estas artikolo, kiu aperis en “la Veu de Catalunya” de 18.12.1909. Ŝajnas, ke la aŭtoro ĉerpis inspiron por la artikolo el la partopreno en Meso celebrata en preĝejo (oratorio de sankta Filipo Neri de Gràcia) bruligita dum la eventoj de la “tragika semajno” (serio da sangoplenaj protestoj okazintaj dum la lasta semajno de julio 1909).